Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-03 sendita el Budapeŝto, la 21an de februaro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# AMO abunde en Ameriko – seminarioj 42 kaj 43

Raportas Sara Spanò, respondeculo pri eksteraj rilatoj kaj aktivula maturigo, kiu vivis dum jaro en Usono, ne malproksime de Novjorko. Ŝi skribas: “Mi havis la privilegion kunlabori de proksime kun la Laborgrupo pri Rilatoj kun UN-Novjorko, kunordigata de Humphrey Tonkin, nia ĉefreprezentanto tie; al li, kaj al ĉiuj aktivuloj de la Laborgrupo iru mia granda danko, ĉar ili modele reprezentas la ampleksan, multkapablan mozaikon bezonatan por antaŭenigi la eksterarilatan laboron.

Mi kunpartigas iom da materialoj pri la lastaj monatoj dum kiuj ni ĉiuj kunmetis diversajn kontribuojn, spertojn kaj stilojn por antaŭenigi la agadon, kaj dum kiuj intensiĝis ankaŭ la kunlaboro kun Rakoen Maertens, komisiito de TEJO pri agado ĉe Unesko.

Unu el la decidoj de la interna laborkunsido pri Eksteraj Rilatoj en decembro 2017 estis aranĝi AMO-seminarion, kaj tio okazis la 27-an de januaro 2018. La raporto pri la 42-a AMO-seminario estas longa kaj detala, ĉar mi preferis disponigi per ĝi ĉiujn informojn. La kontribuoj, kaj de la gvidantoj kaj de la partoprenantoj, estis variaj, kaj tre valoraj:
https://docs.google.com/document/d/17YTF1Scyfff6cn4dgVTz1x5F6BAmW0N2YCZs_vWRcZU/edit.

Pli sinteza versio legeblas alkroĉe aŭ ĉi tie:
https://docs.google.com/document/d/1BGSGR9_65AmNdSdazH38xBCT-tmjPk4IeZBYbGMXveA/edit)

Materialoj pri la 42-a AMO-seminario (mi enkondukis tie la saman ŝablonon kiun mi uzis por AMO-43): https://www.dropbox.com/sh/jpeimejw472ukk4/AADDVV5Ji4UgUSTszmpfxDGya?dl=0

Unu el la kontribuoj dum la seminario estis tiu de Rakoen Maertens pri Modela UN kaj ĝia aplikindeco en Esperanto (EsperantoMUN), agado kiu havas kaj kapabligan kaj konsciigan valorojn:
https://docs.google.com/document/d/1CaDO0LAg7WU8udXBXTjzyrEORyTkwZMEpUDHwghxd6A/edit

Per la ligilo alireblas lia priskribo pri la agado kaj propono provi enkonduki eksperimente simpligitan EsperantoMUN, ekzemple dum la UK en Lisbono. Mi taksas tiun ideon tre

interesa kaj konkretiginda. Konstanta kunaganto en ĉio ĉi estis kaj estas Francesco Maurelli, vicprezidanto de TEJO pri rilatoj kun UN kaj Unesko.

La prezentaĵo pri la konsilaro de Humphrey Tonkin havas iom apartan historion, ĉar mi pretigis la lumbildojn kunligante spritajn bildojn kun liaj konsiloj, sen montri al li la finan rezulton antaŭ la seminario. Ni travivis certe densajn kunkapabligajn horojn en Novjorko, sed la etoso estis samtempe riĉa je pluraj anekdotoj, el la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1954 kaj pri la Kongresa Aŭkcio en 2011.

# Ameriko analizas sin – helpe de AMO 43

Raportas la estrarano de UEA respondeca i.a. pri Aktivula Maturigo, Sara Spanò:

La 9-a TutAmerika Kongreso (TAKE) estis fermita hodiaŭ, la 17-an de februaro en Havano. Laŭ la konsciiga, kapabliga, komunuma vidpunktoj, ĝi funkciis elstare, danke al la sperto kaj konoj de la gvidantoj de Kuba Esperanto-Asocio, kun aldona valoro: la homrilata flanko. Ne povas manki aparta danko al la tuta LKK, kiu nelacigeble certigis la plene funkciantan okazigon de la kongreso.



Maldekstre: alparolo en AMO; Sube: Fiera montro de diplomoj pri la partopreno en AMO 43.



Pri miaj kontribuoj nome de UEA:

- Inaŭgura parolado de Mark Fettes aperis en la kongresa libro, aldoniĝis skriba saluto de Lee Jungkee kaj tiu de mi farita vive: https://docs.google.com/document/d/1i9npR87gcSj2-nCpr4xDKBZCT6mKyAYQPPcJcHNTen8/edit
- Kontribuo en la hispana por la kuba televido, kiu aperis plurfoje, kaj en Esperanto por aliaj kanaloj. Estis strange esti rekonata de homoj en restoracioj, gastejo, ktp., sed tio signifas ke la kongreso havis bonegan videbligon.
- Sesioj kaj subteno dum la AMO-seminario - vidu la alkroĉitan raporton.
- Kunsido pri Ĝemelaj Urboj; kun rakonto de spertoj, i.a. pri la ĝemeliĝo inter Santiago de Kubo kaj Triesto en Italio. Mi parolis pri la valoro de ĜU, komentis pri

la ĉefaj defioj identigitaj de la ĉeestantoj, kaj invitis kontaktiĝi kun UEA okaze de novaj projektoj, ideoj, sugestoj ktp. por ricevi konsilojn kaj subtenon.

- Prezento pri UEA kaj ĝia agado. Homoj estis pozitive surprizitaj ne ricevi frontan, statikan prezenton, sed aliformatan. Aprezita ankaŭ la engaĝa diskutrondo de TEJO.

Mi kaj Francesco Maurelli, vicprezidanto de TEJO, vizitis la sidejon de la Kuba Asocio pri UN (ACNU), akompanate de Julián Hernández Angulo, reprezentanto de KEA ĉe ACNU, kie KEA oficiale membras delonge. La celo de la vizito estis akiri subtenon de ACNU por la kandidatiĝo de UEA al la Estraro de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en konsultaj rilatoj kun UN). Danke al la favora kunlabora grundo kreita de la bonaj rilatoj kun Kuba Esperanto-Asocio, al kiu ni aldonis internacian dimension, ni trovis grandan kunlaboremon kaj subtenemon flanke de la Prezidanto de ACNU, Fermín Quiñones Sánchez. Grave estis povi transdoni, danke al la teama laboro de pluraj aktivuloj, dokumentojn en la angla kaj la hispana pri UEA kaj ties starpunktoj pri temoj rilataj ĉefe al edukado kaj daŭripova evoluo. La kunlaboro de TEJO estis nemalhavebla por antaŭenigi la tutan aferon.

Ĉi tie mi kunhavigas al vi kelkajn dokumentojn kaj materialojn:

- La raporto pri la 43a AMO-seminario estas alkroĉita kaj plie trovebla ĉe:: https://docs.google.com/document/d/1bjVoJdKLj0_h2Zau8bqeKGGnySTH3RROPafOKL5WSdY/edit
- Pliaj AMO-materialoj kun nova ŝablono kaj ĝisdatigitaj informoj troveblas ĉe: https://www.dropbox.com/sh/bje82w22nrh58ck/AABQyuvOGPwlAQ9V5DZsa61ka?dl=0.

Vortoj = 755

AMerikO

AMO brakumas tutan kontinenton

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.